**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

N-ro 44/76 - 10 nov 1976
Aperas ĉiusemajne

Subtenu la revuon
"JUNA AMIKO"

Mendu la ĝis nun aperintajn 9 numerojn! Prezo 9,- GM
Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo!

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Interparoloj en Bonn

Hamburg (pp) - Okaze de vizito al Bonn s-ino Elsbeth Bormann, GEA-estraranino pri informado kaj parlamenta agado, havis kelkajn interparolojn kun gravaj personuloj, la 2-an kaj 3-an de novembro.

S-ino Bormann renkontiĝis kun s-ino Marie Schlei, ŝtatsekretario en la oficejo de la federacia kanceliero, en ties oficejo. Montriĝis, ke s-ino Schlei estas pozitive interesata pri la Esperanto-laboroj, nacie kaj internacie. Speciale granda estis ŝia intereso pri la virina laboro en UEA, al kiu ŝi pretas helpi, se estos konkreta afero. Ŝian plej grandan atenton vekis la plano de la Socialdemokrata Partio de Italujo (PSDI) aranĝi konferencon de socialdemokrataj esperantistoj. Ĉar la itala iniciato ĝis nun ne realiĝis, s-ino Schlei, montrante komprenon kaj bonvolemon, sugestis aranĝi tiun aŭ similan konferencon en Germanujo, eventuale en Bonn. Je la fino de la interparolo s-ino Schlei petis pri daŭra informado.

S-ino Bormann povis paroli ankaŭ kun la persona referento de kanceliero Schmidt, sinjoro Peter Walther, kaj mallonge kun s-ro Bölling, la ĉefo de la Federacia Oficejo por Gazetaro kaj Informado.

Unua kontaktparolado okazis kun s-ino Wahl, gvidanto de la fako interna politiko ĉe la estraro de CDU (Kristan-Demokrata Partio). S-ino Wahl estis pozitive interesita kaj petis pri daŭra informado kaj kontaktado fare de GEA.

En privata interparolo kun la membro de Radio-Konsilantaro de Deutschland-Funk, d-ro Dortans, s-ino Bormann povis informi pri la internaciaj laborojde la Esperantomovado.

Grava interparolo okazis kun la ĝenerala sekretario de la Germana UNESKO-Komisiono, d-ro Rissom, en Köln. Li salutis tiun alpaŝon kaj montris sin bone informita pri Esperanto. Ankaŭ li petis pri daŭra alsendo de informoj kaj pri laŭokazaj personaj vizitoj.

Tre pozitive s-ro Rissom prijuĝis la UEA-laborojn en la de UN lanĉita Internacia Jaro de la Virino, kiu nun estas temo por tuta jardeko. Li proponis, ke UEA petu aligon de sia Internacia Virina Agado al la Internacia Konsilantaro de Virinoj ĉe UN kaj ke la gvidantino de la komisiono ĉe UEA ĉeestu estontece ties aranĝojn. D-ro Rissom ankaŭ sugestis, ke UEA aranĝu mem virinan konferencon de esperantistoj en Federacia Respubliko Germanujo kun eksterlandaj gastoj sub temo de UN aŭ UNESKO. Laŭ li por tiaj agadoj estas je dispono mono por subvencioj, kiujn UNESKO pretas doni al siaj Ne-Registaraj Organizaĵoj.

Konklude s-ino Bormann en cirkulero konstatas: "Ĉiuj vizitoj de tiuj personoj montris, ke la rekono por Esperanto estas bona, eĉ mirige pozitiva. Tio estas jam bona bazo por plua prilaborado en la oficialaj kontaktoj.......Klare estas, ke mi ne povas daŭre nur interparoli pri nia afero kun la oficialaj instancoj, sed ke iam mi devos konkretigi niajn dezirojn. Pri tio necesas ankoraŭ pensi."

## Laborkonferenco en Paderborn

Paderborn (pp) - De la 24-a ĝis 28-a de novembro 1976 okazos en la FEoLL-Instituto pri Kibernetika Pedagogiko laborkonferenco pri "Interlingvistiko en scienco kaj klerigo". Estas antaûviditaj 30 fakaj prelegoj de sciencistoj el universitatoj kaj esplorcentroj en Britio, Belgio, Francio, Svislando, Italio, Aûstrio, Hungario, Jugoslavio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Sovetunio kaj F R Germanio.

La programo ampleksas 4 kadrajn temojn: 1) Lingvistikaj kaj lingvo-kibernetikaj aspektoj; 2) La internacia lingvo kiel lingvo de la estonta internacia scienca kunlaborado; 3) La internacia lingvo kiel instruaĵo; 4) La internacia lingvo kiel bazo de internacia kulturo.

## Esperanto en Radio

Varsovio. Daûras la diskutoj pri la formo de la leterkesto kaj speciale pri la ĉiusemajna statistiko kaj konkurso. Ŝajnas, ke la plimulto de la aûskultantoj konsentas al la nova tendenco, ne plu citi la nombron de alsenditaj korespondaĵoj de unuopaj aûskultantoj, speciale de la "kolonoj" por ne malkuraĝigi la malpli skribemajn.-La radia ĵurnalo kaj la komentario respegulis la viziton de pola delegacio kun Edward Gierek en Sovetunio. - Post sia vizito en F R Germanio kaj partopreno en la Esperanto-konferenco en Leipzig Jerzy Grum denove laboras en la redakcio.- Cetere lasttempe pli ofte oni aûdas la voĉon de Jerzy Uspieński, denove, kiu ja nun estas ja de longa tempo redaktoro en la 3-a Pola Programo.

Svisa Kurtonda Servo. D-ro A. Baur parolis pri sia vizito ĉe la Generala Direktoro de UNESKO en Parizo kaj pri la signifo de Konsultaj Rilatoj de organizaĵoj neregistaraj kun UNESKO. Komence de sia prelego d-ro Baur substrekis la signifon de la ĵus okazinta UNESKO-konferenco en Nairobi kun diskuto pri kontrolo de la amasmedioj. Ges-roj Gacond disaûdigis vere interesan recenzon de la kriminala romano "Ĉu vi kuiras ĉine?"

Vieno. El la ĉi-semajna komentario de d-ro Alfred Macher ni citas:

"Tial nia kanceliero Bruno Kreisky dankis al la Usona Prezidento Ford, kiu iniciatis kaj antaûenigis la politikon de 'malstreĉo", kiu nepre pludaûru.

Esenca merito de Prezidento Ford estas ankaû la Fina Akto de la Konferenco de Helsinki, kies decidoj pri liberaj esprimo kaj interkomuniko de opinioj estas por ni absolute netuŝebla. Tial ni energie protestis - dum la 19-a Ĝeneralkunveno de UNESKO en Nairobi - kontraû la tendencoj de nombro da registaroj - ĉefe el la Tria Mondo - devigi ĉiun alian registaron al kontrolo de la amasmedioj, ĉar ili timas ke ties libereco endanĝerigas iliajn ŝtatojn.

Komprenehle, ke oni ne ŝatas aûdi de ie alie la liberan vorton, kiun oni ĉe si mem malpermesas. Nu, ni aûstrianoj ne intencas enmiksi nin en la aferojn de aliaj ŝtatoj. Sed ni tutcerte neniam obeos iun tian per kiom ajn tiel nomataj "voĉoj" faritan kaj kiom ajn ofte ripetotan decidon.

Kio ajn okazos en la mondo ĉirkaûe, Aûstrio firmtenos plu kaj plu la liberecon de la informado!"

*********************

## Juna Amiko kun prokrasto

Aperis nun n-roj 2 kaj 3 kiel duobla numero de la lerneja revuo "Juna Amiko". Malgraû malfacilaĵoj kaj manko de sufiĉaj abonantoj la redakcio volas daûrigi la eldonadon. Entute nun aperis 3 jarkolektoj

## Homoj kaj Nomoj

### kun kaj sen Renomoj

Hubert X.L. Drabs, Strassen, komencis Esperanto-kurson ĉe la Eŭropa Lernejo de Luksemburgo.

Jenö Zágoni, SF. Gheorghe, Rumanio, opinias, ke la oficialaj instancoj de Rumanio, post ne longa tempo, aprobos landan Esperanto-asocion.

La triesta revuo "Avvenimenti- La città" regule publikigas ĉiusemajne, ekde oktobro 1976, Esperanto-rubrikon, kun konciza gramatiko kaj informoj pri Esperanto-movado. La revueto, grafike belaspekta, temas pri lokaj eventoj, kaj estas rapide populariĝanta inter la urba loĝantaro.

Supera Lingvoinstruistino Ingrid Plazotta, Vieno, invitis al informa babilado la gepatrojn de la 12- ĝis 13-jaruloj, kiuj estis komencintaj, malmultajn tagojn antaŭe, partopreni, kun gepatra permeso, la ĉi-jaran nedevigan Esperantokurson, de ŝi mem gvidatan. La kunvenon ĉeestis ankaŭ la lerneja direktoro, Dr. Karl Harrer.

Renato Corsetti, Romo, parolisto de la Esperanto-programo de Radio Roma, en recenzo de la libro "Honore al ili" diris i.a.: "Ni estas batalantoj por pli justaj lingvaj-kulturaj rilatoj inter la homoj, ankaŭ se ni malvolonte agnoskas tion. Bedaŭrinde batalado ne ĉiam povas esti efektivigata per ĝentilaj petoj al malamikoj, necesas ofte ankaŭ efektive batali, montri forton kaj decidemon kaj diri al niaj malamikoj, kion ni opinias pri ili.
Necesas ankaŭ finfine iam decidiĝi pri kiuj estas niaj amikoj kaj kiuj estas niaj malamikoj. Tiam necesas alianciĝi kun la amikoj kontraŭ la malamikoj.
Mia revo pri la Esperanto-movado bildigas antaŭ miaj okuloj movadon, kiu en ĉiu lando, en ĉiu situacio, estas aliancano de la progresemaj fortoj de tiu lando kaj situacio. Se ni ne kapablos alveni al tiu situacio, ĉio cetera estos vana, kaj ni malvenkos kiel malvenkas je longa tempo ĉiuj malprogresemaj fortoj."

D-ro Ulrich Lins, Köln, verkis germanlingvan traktaĵon pri "La Universala Esperanto-Asocio kaj ĝia sinteno al la paco" (Der Esperanto-Welt und sein Beitrag zum Frieden). La traktaĵo konsistas el du partoj: 1) La sinteno de la Esperanto-movado al la problemo de la paco kaj de popola interkompreniĝo; 2) Praktika laboro per Esperanto por paco kaj interkompreniĝo: kelkaj ekzemploj.

## Aranĝoj en Hungario

Györ (pp) - La 3-an, 4-an kaj 5-an de aprilo 1977 Hungara Esperanto-Junularo kun Teritoria Komitato de HEA aranĝos Junularan Esperanto-Renkontiĝon (JER '77) en la urbo Györ. Limdato por aliĝoj estas la 15-a de februaro 1977. Pli detalajn informojn, aliĝilojn bonvolu peti de Teritoria Komitato de Hungara Esperanto-Asocio, Pf. 228, H-9002 Györ, Hungario.

Sopron (pp) - La 7-an, 8-an kaj 9-an de majo 1977 okaze de 700-jaraj urbiĝaj festoj la Esperanto-grupo "Pacemo" aranĝos 3-tagan renkontiĝon kun la titolo "Esperanto-Tagoj en Sopron". Limdato por aliĝo estas la 1-a de januaro 1977. Pli detalajn informojn, aliĝilojn bv. peti de Esperanto-grupo "Pacemo", Kellner S.u. 12, H-9400 Sopron, Hungario.

## Memoro pri Zamenhof

Varsovio (pp) - Okaze de la Tago de la Mortintoj delegacio de la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio metis florkronon ĉe la tombo de d-ro L.L. Zamenhof en Varsovio.

# Konkurso de Pola Radio

10-tagaj ekskursoj tra Pollando

Valoraj objektaj premioj

estas akireblaj de niaj aŭskultantoj kaj legantoj, kiuj donos respondojn al jenaj demandoj:

1) Kiujn polajn artiklojn oni povas aĉeti en via lando kaj kiel vi pritaksas ilin? Kiuj polaj artikloj (produktoj) ĝuus tie sukceson?

2) Kiel vi vidas la perspektivojn de la plua evoluo de la kunlaboro de via lando kun Pollando? Kio, laŭ via opinio, influis aŭ povus kontribui al plivastigo de tiu ĉi kunlaboro?

3) Kiel vi pritaksas la servan agadon de polaj transportaj entreprenoj (Polaj Aer-Linioj "LOT", Polaj Oceanaj Linioj, Internacia Aŭtomobila Transportado "PEKAES", Polaj Stataj Fervojoj) kaj de la Turisma Oficejo "ORBIS"?

Respondo jam al unu el la supraj demandoj rajtigas al partopreno en lotado de la premioj.

La leterojn ni petas sendi laŭ la adreso:

Pola Radio, Esperanto-Redakcio, PL-00-950 Warszawa 1, Poŝtkesto 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la devizo: "Konkurso", ĝis la 31-a de decembro en la 1976-a jaro (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultojn ni anoncas en la disaŭdigoj de la Pola Radio por Eksterlando la 31-an de januaro en la 1977-a jaro kaj en la marta numero de la monatrevuo "Polska" (Pollando).

La ekskurso de la laŭreatoj de la ĉefaj premioj okazos en periodo indikota de la organizantoj de la konkurso.

Ni deziras bonŝancon en la lotumado de la premioj.

Partoprenu la konkurson mem kaj partoprenigu aliajn!

Polskie Radio Warszawa

Pola Radio disaŭdigas trifoje ĉiutage en Esperanto:

| | | |
|---|---|---|
| 6,00 horo | ondolongoj: | 41 m, 49 m, 75 m, 200 m |
| 16,30 horo | ondolongoj: | 25 m, 31 m, 41 m |
| 22,30 horo | ondolongoj: | 41 m, 49 m, 75 m, 200 m |